



ESPERO KATOLIKA

monata revuo fondita en 1903

JARKOLEKTO 68 n. 621

n.ro 10-11

Oktober-Novembro 1971

PATRINO DE L'AMO

Vizitis ŝin dia Heroldo en la silenta dometo en Nazaret. Li diris al ŝi: « Ave » — tio signifas: estu salutata!

En la modestaj kaj simplaj vortoj li heroldis al ŝi la plenumiĝon de tempoj. Jen; ŝi koncipos kaj naskos la Infanon, kiu havos la korpon malfortan kaj malsaneman — kiel korpo de ĉia estulo naskita de virino — en kiu tamen jam nelonge aperos la krea potenco, la forto plenigi Testamenton, miraklpotenco obeigi la naturon kaj homajn animojn.

Post la silento, en kiu ŝi travivis kaj tradoloris la jugon de l'elektiteco kaj fondis sian liberecon kun tiu ĉi sola kaj nerepetebla Dia Koncepto — kiu por ŝi hodiaŭ estas la ĝojo miksitita kun la angoro kaj morgaŭ estos senmezurebla silenta sufero — ŝi eldiris modesta « fiat ». La momento de la libereco kaj elekto, en kiu pasiĝadis la tuta historio de l'homaro kaj savo, finiĝis per la permeso. Eksplodis en ŝi la Diamo, la potenco de la Patro, kaj Filo, kaj Spirito. Ŝi fariĝis tiu ĉi, kiu ludis en universo tiam, kiam Patro kreadis la mondon. Ŝi estis sub la kruco en la tragedia mallauto — fiera kaj grandioza — kiam Filo por la mondo estis mortanta. Ŝi ricevis en la vespermangejo Spiriton Parakleton, al kiu ŝi dankemis amon kaj naskiĝon de l'infano.

Kaj poste ŝi komencis viziti. Plenplenigita pokalo de l'amo elverŝiĝadis abunde kaj malŝpare. Dinamismo de l'amo kaj impulso, kiujn donis al ŝi la Filo, kvankam ankoraŭ ne naskita — sed jam koncipita — forigis barojn de la tempo kaj spaco, fariĝis eternedaŭra. Ŝi vizitis Elizabeth. Sur la vojo al ŝia parencino akompanis ŝin la tuta naturo en sia printempa beleco. Reakirita filino de Demeter-Persefona bonvenigis ŝin per la subita kaj potenca eksplodo de l'odoro de la kampaj kaj montaj floroj, per la kantado de birdoj, per la susuro de la arboj kaj la brueto de la torentoj. Reprezentantino de Malnova Testamento — Elizabeth — gastigas la Heraldinon de la Nova Testamento. Du grandaj mondoj unuiĝis en la ama ĉirkaŭbrako. Du grandaj ideologioj ne foriĝis, sed kompletiĝis, por jam de tiu tempo en la kompleta kunfando formi la historion de la redempto kaj redemptitoj.

Elizabeth salutis ŝin simile kiel Gabrielo per la vortoj plenaj de la profeta vizio. Kaj ĉi tiu, kiun oni devis jam nomi « Patrino de Dio », per la tremo de la virga koro ekkantis la kantikon, kiu per sia sincereco kaj humileco, per sia senkulpeco kaj ekstazo, resumis ŝian vivhistorion kaj gloron ĝis la fino de jarcentoj. Plurfoje sendube de nun ŝi vizitis siajn samlandanojn, konatojn kaj geparencojn dum la kaŝita vivo de Jesuo kaj dum Lia publika agado. Ŝi estis certe ĉie, kie estis doloro, malespero,

tragedio kaj larmoj por tranqviligi, konsoli, levi animojn kaj kuraĝigi. Ŝia alveno estis la nova spiro de la kredo kaj amo en la sangitajn kaj forviŝitajn korojn, la nova vivo, nova printempo, nova luma futuro.

Ŝi fariĝis Petantino kaj Konsolantino de popoloj por ĉia tempo. Ĉiam kaj ĉie, kiel per la okuloj oni povas ampleksi la historion de popoloj, oni vidas la efikon de ŝia vizito. Dum ŝi vivis, ŝi devis verŝajne danki al Filo, ke li donis plurfoje al ŝi okazon mandoni al malriĉuloj kaj malfortuloj. kaj ĉi tiu mano neniam estis malforta.

Ŝi ne ĉesis viziti nin — malriĉajn ekzilitojn de Heva — dum nia malgaja tera pilgrimado. Ŝi vizitis nin per la interpero de ĉia graco; ŝi kliniĝas super la soleco de tiuj, kiuj velkas en la mizera kaj senvalora vivo; ŝi forviŝas larmojn, plifortigas kaj entuziasmigas al la heroaj agoj. Infektitan homaron de egoismo, ŝi instruas la amon kaj altruismon, oferon pro proksimuloj kaj neprofitemecon.

Por siaj elektitoj ŝi aperas de tempo al tempo perceptebla por la sensaro, bela kaj grandioza, senmakula kaj virga kiel la akvoj de la fonto, sinjorino de la preĝo kaj helpemo. Al ni sufiĉas, ke ni eksentos ŝian spiron. Ĝi tuŝetas niajn trolaboritajn manojn, troplugitajn de la larmsulkoj vangojn, eniras la koron — disŝiras ĝin kaj donas al tiuj, kiuj ĝin speciale bezonas. Ĉar ŝi estas la Patrino de la bela amo.

Sac. Zbigniew Kucewicz (Pollando)

LA TRIA SINODO

212 episkopoj, reprezentantoj de la tutmonda episkoparo, kunvenis en Romon por partopreni la trian sinodon dum la oktobro.

La okazintaĵo havas specialan intereson. En la vatikanaj oficejoj neniam okazis tiel granda partopreno de internacia preso: oni kalkulas, ke en Romo ĉeestas preskaŭ mil ĵurnalistoj, kiel dum la Vatikana Koncilo. Kial? ĉar la sinodo pritraktas la plej urgajn kaj gravajn problemojn: antaŭ ĉio la problemon de la sacerdoteco. Ĝi estas serioza problememo, ĉar de 1964 preskaŭ 20.000 pastroj forlasis sian oficon (ĝis hodiaŭ 13.000 havis oficialan permeson). La nombro de la seminarianoj kaj de la jaraj ordinadoj malpliĝas.

Sed ne ĉio estas negativa en la hodiaŭa Eklezio. Nova vivipovo ŝajnas vigligi ĝin. Ekzemple en la « spontaneaj grupoj », kiuj aperas ĉie, ofte oni trovas novajn formojn de komunuma servo.

La daŭra diakona rango, restarigita de la Koncilo, disvastiĝas: fine de la

pasinta jaro estis ordinitaj pli ol 150 diakonoj, aliaj estas ordinataj ĉiunmonate je kreskanta ritmo.

En Suda Ameriko kaj Afriko virinoj ekzercas diakonajn funkciojn, prezidas la kulton, disdonas la Komunion, celebras geedziĝojn kaj funebrojn. Ili estas kiel diakonoj sen ordino.

Kiel la diakonoj, ankaŭ ili ne celebras la Meson kaj ne prenas la konfeson. En Ameriko, Nederlando kaj Belgujo grupoj da virinoj petas la restarigon de la virina diakona rango, tute malaperinta ek de la XII jarcento. Iuj virinoj preparas sin fariĝi diakoninoj, kiam la Eklezio akceptos lin. Aliaj virinoj petas la aliron al sacerdota rango. Al ni ŝajnas aŭdi la belegan parolon de Kristo: « Virino, granda estas via fido, oni faru laŭ via deziro ».

Kard. Daniélou opinias, ke tio estas ebla kaj atentinda.

La problemoj de la sinodo ne koncernas nur tion, kio krizas aŭ mortas, sed ankaŭ tion, kio volas naskiĝi kaj kreski.

La studoj kaj diskutoj tiurilate multiĝas.

La plej grava demando, kiun la Papo prezentis: al la Sinodo, estas « ĉu oni devos ordini edziĝintajn homojn? ». Oni faris enketojn, ĉu apud laikoj ĉu apud pastroj, kaj la plejmulto da respondoj estis pozitiva. Tamen multaj klopodas konservi la tradician staton.

Dika volumo, presita en Belgujo pere de Mons. Coppens, movis ĉiujn filozofojn, teologojn kaj historiistojn por pledi la konservon de la deva celibato en la latina Eklezio.

Cetere la problemo de la celibato restas problemo de dua rango kaj estas parto de ĝenerala kadro.

La dua granda temo de la Sinodo koncernas la rilaton de la Eklezio kun la mondo. La skemo proponas kuraĝan diagnozon de la nuna situacio. Kontraŭ la opinio kaj la espero de la pasintaj jaroj la subdisvolviĝintaj popoloj ne povas realigi sian disvolviĝon, eĉ ili falas en ĉiam pli malbonan staton. Pasintecce oni havis la iluzion, ke la mizero estos submergata de la tajdo de la progreso. John Kennedy rimarkis, ke tio estas nur iluzio. Fakte la riĉuloj fariĝas ĉiam pli riĉaj kaj la malriĉuloj ĉiam pli malriĉaj.

Laŭ la diagnozo de spertaj ekonomistoj neniam estis en la mondo tiel multaj malriĉuloj.

Post tiel terura diagnozo la skemo de la Sinodo proponas fortajn vortojn, kiuj devus skui la konsciencon de la popoloj favoritaj.

René Laurentin
(traduko de la redaktoro)

PATRO KOLBE

La 17-an de oktobro estis beatigita en la baziliko Sankta Petro la pola franciskano Maksimiliano Maria Kolbe. Ĉe-estis 5.000 poloj. La 28-an de februaro 1941 li eniris la nazisman koncentrejon de Auschwitz. Kiu estis lia kulpo? Patro Kolbe, la « kavaliro de la senmakula Virgulino », por kiu li fondis Niepolanow, centron de la religia vivo, amis multe la homojn: jen lia kulpo.

Kiam li eniris la koncentrejon. li portis la monakan robon, havis sur la brusto la krucifikson kaj ĉe la flanko la rozarion. La komandanto, vidinte la sacerdoton, iĝis furioza: deŝiris lian robon kaj la religiajn objektojn kaj ĵetis ilin sur lian vizaĝon demandante: « Ĉu vi kredas je tio? ». Kolbe respondis: « Jes, mi kredas ». Multaj batoj sekvis tiun kuraĝan parolon, sed li persistis: « Mi kredas je Dio kaj amas lin ».

Patro Kolbe amis multe Dion kaj la tutan homaron, precipe la suferantajn fratojn. En la koncentrejo li aŭdis iam kortuŝantan krion: « Adiaŭ, mia kara edzino! adiaŭ, miaj gefiloj! ». Dek malliberitoj devis morti per malsato, ĉar alia malliberito de la sama loko estis fuĝinta.

Subite el alia grupo disiĝis malliberito, kiu prezentis sin al la komandanto kaj diris: « Mi volus morti anstataŭ tiu viro: li havas familion, mi ne havas familion: mi estas katolika sacerdoto ».

Lia peto estis akceptita. Li oferis sin ne por amiko aŭ kunfrato, sed por nekonata homo, kiun li amis en Kristo.

La sublima sinofero de Patro Kolbe diras al ĉiuj, ke ne per protestoj kaj perforto oni plibonigos la mondon, sed per reciproka amo kaj sindono.

L. B.

LA MONAKEJO DE ZAGORSK EN RUSLANDO.

La oficiala Ruslando estas atea. Multaj preĝejoj estas nun muzeoj, ĉie estas forstrekita la religiaj signoj. Oni havas la impreson, ke la kristana fido malaperis en Ruslando, sed estas supraĵa impresio. La konstato, ke la fido ne estigiĝis, oni havas precipe se oni vizitas la monakejon de Zagorsk, malmultajn km. de la ĉefurbo. Ĉi tie la grandega pompo de la ortodoksa konfesio trovis sian plej gloran esprimon, precipe en la preĝejo de la Sankta Triunuo, kiu donas la nomon ankaŭ al la monakejo. La komunumo estis fondita en 1350. La monakejo estis dum pluraj jarcentoj centro de religiaj studoj. Ankoraŭ hodiaŭ okazas tie solenaj celebroy, kiuj konservas fidele la pompajn tradiciojn de la pasintaj tempoj. Antaŭ ĉio tamen interesas la granda nombro de fideluloj, kiuj partoprenas kun profunda pieco de diservojn.

LA SACERDOTO EN DIALOGO KUN LA MONDO

Ankaŭ neatentaj homoj rimarkas sendube la bruegon pri Eklezio kaj pastroj. Ne estas malfacile aŭdi tiajn demandojn: kio okazas nun en la Eklezio? kial pastroj krizas?....

La pastroj estas tieldire la plej sentema termometro de tio, kio okazas en la tuta mondo: oni devas diri, ke pro la rapidema progreso de la lastaj jaroj ĉio krizas: la familio, la lernejo, la ŝtato... Kial ne ankaŭ la Eklezio, kiu vivas en la nuna historio? Ni povas rigardi iujn aspektojn de la sacerdota krizo, kiu estas signo de kresko, de vivo, de intereso, de konscio pri la grandaj nuntempaj problemoj.

La sacerdoto estas homo sendita por anonci al la mondo la Savinton Kriston Jesuon. Sed la moderna homo kredas, ke li sufiĉas al si mem, ke li bezonas neniun savanton. Paroli al li pri Dio, Eklezio, savo, sakramentoj signifas fari al li paroladon ne nur malfacilan, sed ankaŭ neinteresan.

Memkompreneble tiu situacio ne koncernas ĉiujn homojn, sed multajn sen duboj. Estas do kompreneble, ke la sacerdotoj sentas sin maltrankvilaj kaj demandas sin, kiel ili povas paroli al la indifera mondo de nia tempo, kaj — se ili ne estas akceptataj — ĉu ilia laboro estas utila. En la turmento de ĉi tiuj demandoj iuj povas esti fortege tentataj. Iuj sen-

kuraĝiĝas kaj diras: kial mi devas labori? Aliaj tentas vojojn danĝerajn. Aliaj, eble tre malmultaj, estas venkataj de la mondo kaj, perdinte sian fidon, plimultigas la nombron de tiuj malproksimaj homoj, al kiuj ili devus anonci la savon de Kristo. En tiu ĉi kadro oni povas klarigi la krizon de la celibato. Ĝi estas kuraĝa elekto por sin tute donaci al Dio kaj al la fratoj. Sed kiam tiu donaco, farita kun granda sinofero, ŝajnas refuzata kaj ne estimata de la fratoj, oni povas kompreni la turmentan demandon de iuj pastroj: Kiun valoron kaj signifon havas mia celibato?

Sed estas ankaŭ aliaj motivoj, kiuj klarigas la fermenton inter la sacerdotoj. La Ekumena Koncilo invitis la laikon akcepti gravajn rolojn en la eklezia agado. Iuj sacerdotoj, vidante ke la kampo de ilia agado mallarĝiĝas, fariĝas malkvietaj. Krome la Eklezio per la Koncilo decidis dialogi pli ol antaŭe kun la mondo. Novaj iniciatoj kaj sintenadoj kelkfoje maltrankviligas kvietajn pastrojn, tro fidelajn al la tradicia vivosistemo. Tiel oni parolas pri krizo de maljunaj pastroj. Aliflanke la prudenta ritmo, per kiu la Eklezio realigas la renoviĝon, ŝajnas tro malrapida al multaj pastroj, kiuj deziras senpacience atingi la malproksimumojn kaj adaptiĝi al la rapide progresanta societo. Tiel

oni parolas pri krizo de junaj pastroj, kies renovdeziro — ofte malprudenta sed sincera — ne facile toleras limojn kaj ligilojn kun la pasinteco.

Mi finas citante la vortojn de la Episkopo Enrique y Taracòn dum la nuna Sinodo: « Por direkti la transformiĝon koncernantan la pastron laŭ la persona kaj socia vidpunkto estas necese kompreni bone tiun ŝanĝon kaj ĝies aŭten-

tikon, juĝi ĝin kun spirito de kristana fido. Oni devas antaŭ ĉio agnoski, ke la problemoj de la sacerdotoj naskiĝas de ilia apostolato kaj de la realaj malfacilaĵoj, kiujn ili trovas en sia agado, ne de egoismo kaj kontestemo.

Estas tre grave, ke la Sinodo agnoskas la apostolan fervoron de la sacerdotoj kaj studas en tiu ĉi lumo la praktikajn problemojn ».

Sac. Felice Ruaro

EL LA LANDAJ ASOCIOJ

(cirkulero de nia estrarano Ŝváček al siaj samlandanoj)

La prezidanto inter ni.

En moravia urbo Vsetín (Ĉeĥoslovakio) okazis renkontiĝo de ĉeĥaj kaj slovakaj esperantistoj 24-27. 1971, dum kiu okazis ankaŭ kunidoj de apartaj sekcioj de Ĉeĥa E-asocio. Inter ili okazis ankaŭ la tria landa jarkunveno de katolika sekcio ĉe ĈEA, kiun partoprenis ankaŭ kelkaj katolikaj esperantistoj el Slovakio, entute 50 personoj, kaj kiel gastoj dudek KELI-anoj. Specialan ĝojon ni havis pro ĉeesto de kara IKUE -prezidanto Pastro Longoni, kiu ne hezitis entrepreni lacigan vojaĝon por travivi kun ni kelkajn agrablajn momentojn.

Fakte mi povas konfesi al vi, ke ni estis tre scivolemaj, kia estas la nova IKUE prezidanto. Mi konas lin el limburga kongreso kiel ho-

mon seriozan, malgajan, ŝargitan per gravaj zorgoj. Kaj jen, lia ĉeesto konvinkigis nin pri fakta malo, ĉar li estas homo gaja, bonkora kaj afabla, kvankam certe eĉ pli sargita ol en Limburg. Li estas homo de amo, ĉar la amo elradias el lia vizaĝo, el ĉiu lia vorto. Li amas ĉiujn, eĉ tiujn, kiuj rezistis lin dum kelkaj lastaj jaroj. Ni konvinkiĝis, ke onidiroj pri la plej « malbonkvalita » IKUE prezidanto ne estas veraj. Jes, verŝajne li ne regas pri granda elokventeco, sed li regas pri la amo kaj per la amo. Ĉu oni siatempe ankaŭ ne asertis, ke novelektita papo Johano XXIII estas nur transira, provizora papo? Kaj tamen montriĝis, ke li estas persono granda kaj estimata de la tuta

mondo, kiu postlasis grandajn fruktojn. Laŭ niaj propraj konvinkoj malaperis ĉiuj nuboj de malfidemo, ĉar la IKUE-prezidanto estas homo vere fidinda kaj sindona. Grandan ĝojon kaŭzis al ni la interparola sciigo, ke li estas persona konatulo de nia kara Sankta Patro Paŭlo VI, kies voĉon ni ĉiam pretas obei. Firme mi kredas, ke sub la patreca prezidado

de Pastro F. Longoni, ekregos en IKUE denove konkordo kaj harmonio, ke la amo repacigos ĉiujn kaj gvidos katolikan movadon al nova ekfloro kaj prosperado. Sed ne forgesu, ke la nova prezidanto kaj IKUE nepre bezonas subtenon kaj kunlaboron de ĉiuj anoj. Do kun nova entuziasmo ni eklaboru!

Miloslav Šváček

JEN LA MALLONGA PRELEGO DE NIA PREZIDANTO

Tre karaj gefratoj,

mi opinias ke vi povas bone imagi grandan ĝojon pro mia ĉeesto intervi. Antaŭ mi, jam aliaj prezidantoj de IKUE venis vin viziti, pastro Beckers kaj s-ro Tujnder.

Verŝajne mia elekto al la tasko de Prezidanto estis kaŭzita de vi, de via multnombra partopreno al la voĉdonado. Unuflanke mi devas danki, pro via fido en mi; aliflanke mi devus ne danki pro la grava zorgo kiun vi trudis al mi (ridetante).

Sed mi venis ĉi tien, precipe, por lerni el via varma katolika sinteno, el via batalanta kuraĝo, el via konstanta fideleco al la Papo. Tiuj estas veraj armiloj por certa venko.

Via sankta Reĝo, kaj martiro, Venĉeslao, kiu protektas vin, ne venkis per glavo sed per interna spirita forto.

Ni devas adori la misteran volon de Dio, ĉiam bona kvankam nekomprenebla, kiu volis kunigi vin al la suferado de Jesuo.

Tamen la malfacilaĵoj de via situacio fortigas vin en la kredo, kaj purigas vian kristanan sintenon. Male okazas ĉe ni mi parolas sekve de miaj personaj spertoj, ke la tre favoraj situacioj dormigas, malplifortigas, malvarmigas niajn fidelulojn kaj, sekve, la neatalantaj kristanoj indiferentiĝas, kaj ne bone vivas la kristanisman.

Laŭ la vorto de la hodiaŭa Evangelio ni povas atente konsideri la riĉulon, ĉiam bankedantan, vestiĝanta per trekostaj vestaĵoj kaj la malriĉan mizerulon, Lazaron, kiu neniam povis ĝui la mondajn plezurojn. La riĉulo estas signo de la moderna teknika mondo, kiu fidas nur je la maŝinoj, je la financoj, je la materiaj rimedioj. Bedaŭrinde ni scias kien nin povas konduki la tekniko sen la amo. En duono de tago la atobomboj po-

vas detrui la tutan homaron; la teknikan forton, kiun ni kreis, ni mem ne plu povas kontroli.

En Londono, dum la interreligia kunveno, ĉiuj prelegintoj pri la progreso de la homaro, parolis pri la neceso de amo kaj de interna renoviĝo de la homo.

Kion, do, mi devas konsili al vi?

Ne perdu vian forton; uzu karitan sintenon ankaŭ rilate maĵamikojn. Precepte rilate ilin.

Ĉu la moderna mondo povos returni kaj denove kredi al Dio?

Sendube; se la homoj vidas karitan agadon, vian amon.

Oni ekkonos ke vi estas miaj disĉiploj jene: se vi amas vin, reciproke, unu la alian.

La homaro ne vidas nun Jesuon Kriston, tamen ĝi povas vidi nin. Se ni estas vere atestantoj en tiu ĉi mondo de la kristana mesaĝo, iom post iom la mondo devas kredi ke Jesuo Kristo venis sur la teron por savi la homaron, kaj ke Jesuo Kristo estas vere Filo de Dio.

« Vi ĝoju, kiam vi suferas persekutadon pro mia nomo; ĉar viaj nomoj estas skribataj en la ĉieloj ». Obstine kredu! Obstine amu! La fina venko estos al vi.

* * *

En apartaj personaj interparoladoj nia Prezidanto diris al ni ke dum sia vojaĝo tra nia lando li ne povis kompreni nian lingvon sed li aŭskultis tre plezure la dolĉan sonon de nia prononco, tiel milda kiel la teritori aspekto. Li tre plezure trovis ke en la vagonaro oni povas legi avertojn, en kvin lingvoj skribitajn, ĉeĥa, rusa, germana, franca kaj itala. La ambicia angla lingvo ne estas uzata en la ĉeĥaj vagonaroj.

Li povis ankaŭ trankvile interparoli kun niaj estraranoj kaj samideanoj kaj aŭskulti iliajn personajn problemojn.

Li fakte havis grandan ĝojon sciiginte pri vigla agado de nia junularo; li estis feliĉa inter ni, ĉar li povis propraokule konvinkiĝi pri nia esperdona junularo. Ĉiuj niaj karaj ĉeestintoj tre plaĉis al li. Li povis, kune kun ni, ĝui specialan ĝojon rigardante lumbildojn pri LET (nia somera tendaro en Herbovitce).

Kore salutas, forte manpremas kaj brakumas vin via frato *Miloš*

ITALUJO: RENKONTIĜO DE KATOLIKAJ KAJ PROTESTANTAJ MISIISTOJ.

En Romo apud la centra seĝo de la FAO renkontiĝis katolikaj kaj protestantaj misiistoj. Organizis la kunvenon la « Agrimissio », la nova organismo fondita en Ameriko por organizi pli efikan kunlaboradon inter FAO kaj la misiistoj laborantaj en ĉiuj nacioj sur la vojo de la disvolviĝo.

LA PARABOLOJ DE JESUO

« Per multaj paraboloj Jesuo parolis al ili la Vorton... », rakontis Marko (4-33). La ekzegezistoj malkonsentas pri la nombro de tiuj ĉi paraboloj, de 27 ĝis la cento, se oni konsideras kiel parabolojn simplajn komparojn. Kiaj ajn estas la opinioj pri tio, certe laŭ la evangelioj, Jesuo prefere uzadis tiun literaturan genron, kiu cetere apartenas al la biblia kaj orienta tradicio. Marko eĉ precizigas: « Sen parabolo li ne parolis al ili: sed private li klarigis ĉion al siaj disĉiploj » (4, 34).

La evangeliajn parabolojn kompreni necesas do por ekkapti la mesaĝon de Jesuo kaj samtempe senvualigi la misteron de lia persono.

Mi intencas komentarii kelkajn parabolojn de Jesuo en nia bulteno — kompreneble se la legantoj akordiĝas kun tiu projekto.

Nia celo estus helpi la mediton pri la evangelio. Tiel ni ankaŭ parte plenumus unu el la plej grandaj deziroj de la Dua Vatikana Koncilo (« Dogma Konstitucio pri la Dia Revelacio », i. a.):

« Necesas, ke la tuta eklezia predikado, same kiel la kristana religio mem, estu nutrata kaj regata de la Sankta Skribo » (N^o 21).

* * *

« Necesas, ke la Sankta Skribo estu amplekse atingebla de la kristanoj » «N^o 22) k. t. p.

Ni inaŭguru tiun serion per tute simpla parabolo entenata en unu paragrafeto: *la parabolo pri la bona plugisto*.

« Neniu, metinte sian manon al la plugilo kaj rigardante malantaŭen, taŭgas por la regno de Dio » (Luko 9,62).

— *Unua rimarko*: Laŭ la kutimo Jesuo ĉi tie uzas bildon el la ĉiutaga vivo. Liaj aŭskultantoj estas plejparte kamparanoj kaj vilaĝanoj. Kio pli ordinara por ili ol la sceno de viro pluganta sian agron? Jesuo adaptiĝas al sia aŭdantaro kaj al la popola psikologio: li parolas pli bilde ol abstrakte.

— *Dua rimarko*: Kuntekstleĝo. Por ekkapti la instruon de parabolo ofte necesas remeti ĝin en la rakonto aŭ parabolo en kiu la evangelisto intence enmetis ĝin. Tie ĉi nia parabolo sekvas rakonton pri konkretaj ekzemploj de apostola voko. Ĝi ilustras tion, kion la Sinjoro postulas de siaj disĉiploj, nome tutan kaj tujan pretecon. Kiu volas sekvi Jesuon, tiu devas sin doni senprokraste al la servo de la Diregno, sen prizorgi siajn interesojn. Tia absoluta postulo estas fondita sur malfacilaĵoj de la apostola misio, kiel oni povas vidi en la sekvanta ĉapitro de Luko (Misio de la 72 disĉiploj elektitaj de Jesuo). Ankaŭ ni memoru, ke multaj disĉiploj

forlasis Jesuon. (vidi Johano 6, 66-67).

— *Tria rimarko*: Unueco de ambaŭ Testamentoj. Jesuo kaj lia aŭdantaro perfekte konis la Sanktan Skribon (kompreneble la parton, kiun ni nomas Malnova Testamento). Tial la Majstro ofte prenadis siajn bildojn el la biblia literaturo aŭ aludis al epizodoj de la izraela historio. Pri tiu ĉi parabolo, vi devas speciale relegi la belan rakonton pri la vokiĝo de Eliŝa, disĉiplo de Elija (1 Reĝoj 19, 19-21). Okulfrapa estas komparo: ni havas antaŭe iel konkretan kaj historian ilustraĵon de la evangelia parabolo (legu kaj vi mem vidos).

— *Kvara rimarko*: Ofte interese kaj lumigante estas konsideri la ĉitaĵon aŭ adapton aŭ paralelan tekston de iu diro de Jesuo en alia peco de la Nova Testamento. Tiukaze la parabolo estas propra al Luko (komparu la du paralelajn paragrafojn de Mateo 8, 57-62).

Sed ja ŝajnas, ke Paŭlo siaflanke konservis la ideon, se ne la bildon de la bona plugisto, kiam li evokis sian apostolan vokiĝon:

« Forgesante tion, kio estas malantaŭe, li skribis, mi min pelas al la celo, por akiri la premion de

la supera voko de Dio en Kristo Jesuo » (Filipianoj 3, 13-14).

El la bildo de plugisto Paŭlo pasis al tiu de kuranto. Memkomprenebla estas la adapto, ĉar li skribis al urbanoj, kiuj vizitadis la stacion, dum Jesuo paroladis al kamparanoj.

* * *

Por ni nuntempe estas klara kaj aktuala la instruo de la parabolo pri la bona plugisto. La disĉiplo de Kristo devas forlasi ĉion por la dia regno kaj senkondiĉe sekvi la Sinjoron (vidu same alian tekston de Luko 14, 26-27). Se al tiu, kiu ne ricevis la proprasence disĉiplan vokon, la postulo ne estas tiel absoluta, tamen li devas kiel kristano sen kompromiso aparteni al Kristo. Kriston sekvi estas: sin lasi ekpreni, transformi, transfiguri kaj kun li antaŭen iri tien, kien li gvidas. Sopirado pri estinteco same kiel kontesto pri kristana Kredo aŭ katolika Eklezio parencigas al tiu « rigardo malantaŭen » de la parabolo.

Ni do estu bonaj plugistoj, « forgesante tion, kio estas malantaŭe » sulkante rekte en la kampo de la Patro post Kristo, kiu estas « la Vojo, la Vero kaj la Vivo » (Johano 14, 6).

Gérard - Henry Baudry

PIMEN: LA NOVA RUSA PATRIARKO.

Dum la solena celebrazo de la nacia koncilo de la eklezio ortodoksa estis elektita de la 70-aj jaroj de la koncilo la patriarko ortodoksa. Pimen, kiu estis dum unu jaro patriarko « ad interim », estas konata pro sia klopodo por renovigi la rusan eklezion kaj pro sia malfermo al la ekumena dialogo. Oni ŝuldas al Pimen, ke antaŭ dek jaroj la rusa eklezio komencis partopreni en la Ekumena Koncilo de la Eklezioj. Kune kun la patriarko Aleksio li estis tiam unu el plej fervoraj favorantoj de la dialogo kun ĉiuj kristanaj eklezioj.

NI GRATULAS.

Okaze de la 75-a naskiĝtago de registar-inspektoro Antonio Ruperto Sittl ni esprimas niajn plej korajn gratulojn kaj bondezirojn. Sam-ano Sittl fondis en la jaro 1955 la katolikan Esperanto-grupon « Pax Christi » en Bavario, en 1956 la Katolikan bavaran Esperanto-ligon kaj en 1957 la katolikan Esperantomision de la eŭropa junularo.

LA LEGANTOJ SKRIBAS.

Familio Beck el Konstanz (Germanujo):

Ni estas tre feliĉaj, ke Felice estas redaktoro de EK. Vi estos feliĉa kaj fidela redaktoro, ĉar Verona jam ek de multaj jarcentoj ĝuas la titolon « fidela ». Ni deziras al Vi sukceson kaj ĉion bonan.

S-ro Colin Elmer el Aŭstralio:

Mi estas 28-jara poŝtisto, fraŭlo, deziras korespondi.

Mia adreso: S-ro Elmer Colin, 26 St. Georges Road. VICTORIA, Aŭstralujo.

Jirina Märzová el Strakonice (Ĉeĥoslovakujo):

Mi havas ĝojon, ke Vi estas redaktoro de EK.

Via helpo al la redaktoro de « Verona fedele » dum la jaroj 1946-47 kaj Via longjara agado kiel sacerdoto kaj profesoro esperigas, ke Vi faros pli interesan kaj pli belan nian revuon. Multajn gratulojn kaj bondezirojn!

Aleksandro Girginov (bulgara dramverkisto)

AVE MARIA DE BLINDULO.

Mi gastis ĉe iu familio.
Vintra vespero. Teo, konversacio, rido, gramofono kaj tiel plu.

Subite la domomastrino aŭdigis sin: « Sinjoroj, mi petas iom da silento. Ĉu vi ne ŝatus aŭdi belan gramofonplaton? »

« Kun plezuro, sinjorino », respondis iuj.

Ni silentiĝis. Ŝi malstreĉis la risorton kaj sidiĝis. La nigra disko egalmezure ektorniĝis, kaj tuj la ĉambro solene pleniĝis de sorĉa kanto.

Io ekprenis nin.

« A-ve Ma-ri-a... », vibris la membrano. « A-ve Ma-ri-a..., ekvibris ankaŭ niaj animoj.

Kiam ekmortis la lastaj vortoj de la kanto kaj fandiĝis en la senbruon, la

gramofona pinglo saltetis kaj komencis grati, ĉiuj ni elvekiĝis el sonĝo.

« Admirinde! » flustris iu.

Silento.

« Jes, admirinde! » ripetis alia. « Kiam mi aŭskultas tiun preĝon, » komencis la sama, « mi ĉiam rememoras mian blindan kolegon, muzikanton. Kiel bele li ludis tiun saman « Ave Maria ». Precipe la lastan fojon, kiam li ludis ĝin, en ĝin li enverŝis sian tutan doloron. — doloron, kian nur blindulo povas havi. La rememoro min ekprenis, kaj se mi ne enuigas la societon, permesu al mi rakonti al vi tiun okazaĵon ».

« Jes, jes, rakontu » diris ĉiuj.

« Bone! » li respondis, bruligis cigaredon, apogis sin al la seĝo kaj malrapide ektrakontis.

« Estis en la tempo, kiam tiuj aparatoj ne estis tiel perfektaj kaj disvastigintaj kiel nun, kiam ankoraŭ ne estis radio kaj laŭtparoliloj, kiam ĉiu biejo kaj restoracio posedis sian orkestron, kaj kiam oni serĉis kaj bone pagis la muzikistojn.

Dum iu somero, pro sanstataj kaŭzoj mi devis pasigi la tempon ĉe la maro. Samtempe mi volis ne resti senlabora. Mi pensis: mi serĉos iun kolegon liberan, kaj kun li ni trovos tempon en iu urbeto ĉe marbordo. Mi forveturis al M... Kaj jen tie la hazardo min renkontigis kun blinda violinisto. Lia nomo estis Konstantin.

Li havis riĉan, varian repertuaron, kvankam li ludis ĉion parkere; homo kun forta muzika memoro. Mi ne forgesis diri al vi: li estis sufiĉe multe studinta, kvankam ne ĝisfine en la muzika akademio. Tiam kaj iufoje nun, memorante lin, mi havis la penson: jen tiu homo sen tiu malfeliĉo, estus unu el niaj unuaj violonistoj; sed la kruela sorto estis seniginta lin de plej valora, de la vidsento; dum la lasta milito grenado vundis kaj kontuzis lin forte. Li restis viva, sed liaj okuloj malfortiĝis, kaj baldaŭ li blindiĝis. Kuracista helpo ne estis por li. Kosta rakontis i. a. al mi tion. Ĝenerale li ne ŝatis paroli pri si, kaj al mi ne estis oportune eldemandi lin. Ni amikiĝis kaj trovis laboron en somera ĝardeno Al la Blanka Mevo'. La stablo estis sufiĉe bona, la unua en la urbo alvido al la maro.

Dum labortagoj la stratoj de la urbeto estis dezertaj. Estis varme. Malofte videtiĝis preterpasantoj. Sed vespere, ĉ. la 7-a, 8-a horo, kiam ekblovetis agrabla malvarmeto de la maro, oni ekkrampis sur la stratoj kaj en la "Blanka Mevo" estiĝis vera festo — restis eĉ ne unu neokupita tablo.

Preskaŭ ĉiuj bangastoj vizitis "Blankan Mevon". Ĝi havis bonegan situon: antaŭ la rigardo malfermiĝis netaksebla akva vasto, kvazaŭ malfaldida, blua atlaso; en la malproksimo tremetis fiŝistaj barkoj kun etenditaj veloj. Kiam ni ĉesis ludi, ni aŭdadis, kiel

la ondoj malsupre rompiĝis kontraŭ la roka bordo.

Kvankam ne-modeste, mi ne povas pri-silenti, ke unu el la kaŭzoj de la pleniĝo de « Blanka Mevo » estis ankaŭ nia muzika programo kaj la bona ludo de la kolego.

Iufoje mi aŭdis, ke trans la fenestro malfermita de la hotelo iuj diris:

« Aŭdu, ĉivespere ni renkontiĝos ĉe la blinda violinisto, ĉu ne? »

Kaj vespere ne malofte mi aŭdis ek-kriojn:

« Kiel bele ludas tiu violinisto! »

Vere Kosta estis talenta. Li ludis kun profundo kaj kun sento. Per sia arĉo, kvazaŭ per magia vergo, li kreadis, kontruadis novan mondon, la mondon de la transa, de la eterna revo. Li streĉis nun luman kordon super la dronintan en la malluma maro kaj laŭ ĝi volis konduki la animojn de la homoj. Ĉio ekmortis la nokto sin premis ĉe la barilo, malsupre kvietiĝis la maro, kaj ĉirkaŭ ni — eĉ ne unu sono, ne ne unu tinto de glaso.

Tiel li ludis.

Kaj kiam la sono de lia violono, ekmortinta, dronis en la maron, li mallevis sian brakon kaj modeste riverencis per la kapo.

Ektremis la homoj kaj forŝiris sin en la revoj; ventego de aplaŭdoj eĥigis la nokton. Kaj kvazaŭ ĉies okuloj pliheliĝis, pliruĝiĝis la vino. Bruo, interparolo, festeno...

Ne malofte mi aŭdis paroli pri li:

« Se li ne estus blinda, ĉu li povus ludi tiel bele? »

« Por li la tuta senco de la vivo estas la muziko » respondis alia.

Iuj sinjorinoj diris:

« Beduaŭrinde! Kiel bela viro! »

Li ŝatis, ke dum la paŭzoj mi sidiĝu apud lin kaj rakontu pri tio, kion mi vidis, pri la vizitantoj, geviroj, pri ĉiu nova, aparta aĵo. La vizitantoj estis preskaŭ ĉiam precize la samaj kaj Kosta — ĉu laŭvoĉe, ĉu laŭ la irado — komencis distingi ilin. Iun vesperon li demandis min:

« Jen, ĉu ne nun alvenis tiu sinjorino ĉe la lasta tablo? »

« Jes, ŝi estas ĉi tie, Kosta. Laŭ kio vi rekonis ŝin? »

« Laŭ ŝiaj paŝoj. Krome, ĉu vi ne remarkis, ke ĉiam, kiam ŝi envenas, la ĝenerala bruado mallaŭtiĝas, silentiĝas ».

Iom poste li aldonis:

« Vere, ĉu ŝi estas tre bela? »

« Ho, jes, tre! » mi respondis. « Unu el la plej belaj virinoj, kiujn mi renkontis ».

« Ĉu ĉiuj alrigardas ŝin? »

« Jes, ĉiuj, kaj viroj kaj virinoj »

« Kaj, kiel vi diras, ĉiam sola ŝi estas »

« Jes, ĉiam ».

« Kaj kio estas la aparta pri ŝi? »

« Ŝiaj okuloj ».

« Ĉu nigraj ili estas? »

« Jes, nigraj ».

Li iom peze ĝemis, ekfrotis la frunton per la mano kaj diris nenion pli.

La nigraokula sinjorino venis ĉiam en la sama tempo, sidiĝis ĉe la lasta tablo, apud la barilo de la teraso, mendis vespermanĝon, kiun ŝi ĉiun fojon apenaŭ tuŝis, aŭskultis iom la muzikon, admire rigardis iome la maron kaj foriris. En ŝia rigardo estis io stranga, profunda, kiam ŝi preterpasis nin, ŝi ĉiam iel pli longe alrigardis Kostan. Ĉiuj virinoj alrigardis lin.

Mi diris, ke li ne ŝatis paroli pri si, sed iun vesperon li permesis al si iom pli. Ni parolis pri la malbonŝancoj de la soleca, vagula vivo.

« Sed kial almenaŭ vi, kial vi ne edziĝas? » Ĉu la tutan vivon estos tiel pri vi?

Mi respondis al li:

« Mi ne ĵuris pri tio, homo ne scias, kiam alvenos lia blinda semajno ».

« Ĉu la blinda? », li ripetis kaj ridetis. Sammomente mi bedaŭris, ke mi ellasis tiun vorton. Ĉiam mi gardis min, por ke mi ne diru ion, kio rememorigas al li lian malfeliĉon.

« Jes, vere oni diras tiel — blinda semajno — ».

« Ĉu vi neniam estis edzo? mi demandis. »

« Ne, nur fianĉo. Restis ankoraŭ kelkaj semajnoj ĝis la geedziĝo, sed la milito komenciĝis kaj mi iris al la fronto. Ni disiĝis kaj mi neniam renkontis plu la fianĉinon. Post mia vundiĝo mi ne volis aŭdigi min al ŝi. Kio okazis pri ŝi, mi ne scias, eble ŝi edziniĝis ». Li eksilentis iomete kaj poste daŭrigis: « Ĉu mi estu devinta malfeliĉigi ŝin por suferi kune kun mi? Restis al mi de ŝi nur unu luma memoraĵo, kiu neniam revenos, samkiel sola portreto, kiun bedaŭrinde neniam plu mi povos vidi ».

« Ĉu vi dezirus ŝin renkonti? »

« Ne, tio ne devas okazi. Pro ni ambaŭ ».

« Sed, se ŝi ankoraŭ amas vin kaj ekdeziras ligi sian vivon kun la via? »

« Neeble: Mi ne volas, ke iu ajn oferu sian feliĉon pro mi. Kiel ajn, sen mi ŝi estos ĉiam pli feliĉa ».

Li parolis mallaŭte, sufoke.

Poste li daŭrigis revante:

« Ŝi tre ŝatis la muzikon, ludis pianon. Preskaŭ ĉiun vesperon ni ludis kune. Kiel bele estis! »

Post iom da silento, li reprenis per alia tono:

« Generale mi ne ŝatas rakonti, pri mi. Estas vane. Sed ĉivespere, kiu scias kiel, mi tiriĝis al tio ».

« Oni iufoje bezonas eldiri tion, kio pezas.... Oni malpeziĝas ».

« Vere, malpeziĝas.... ».

Ni eksilentis. La maro frapadis, kvaŭzaŭ tuj sub la fenestro.

Longa paŭzo. Kaj kiam mi supozis, ke li jam dormas, li ekparolis:

« Vi diras, ke tiu sinjorino ĉe la lasta tablo estas tre bela. Ĉu? »

« Jes, Kosta. Tre ».

Kion pensis ja tiu homo?

La alian vesperon, kiam la nekonatino eniris kaj preterpasis nin, Kosta ridetis kaj mallaŭte diris al mi:

« Jes, ien ŝi ree ĉeestas, ĉu ne? »

« Jes, ŝi estas ĉi tie ».

Vere nur nun mi rimarkis, kiel ĉiuj silentiĝis, kaj ekrigardis ŝin, kiam ŝi preterpasis la tablojn.

Iun fojon, kiam ŝi preterpasis nin, la kelnero atingis ŝin kaj transdonis al ŝi ian paketon, forgesitan sur la tablo, ŝi dankis al li. Tio ne estis io speciala, sed kiam ŝi ekparolis, mi vidis, kiel mia kolego ekpaliĝas kaj apenaŭ povas teni la arĉon.

La sekvan tagon li estis tre indispozicia kaj silentema. Vespere li proponis al mi, ke ni ludu « Ave Maria ». Ĝis tiam ni ne estis ludintaj tion.

« Ĉu vi scias ĝin? » li demandis.

« Jes », mi respondis. « Mi scias ĝin ». « Jam delonge mi ne ludis ĝin », li aldonis. « Eble mi forgesis ĝin, sed ni provu, ĉu ne? »

Ni komencis. Kosta min surprizis, li ne nur ne estis forgesinta ĝin, sed tiel majstre ĝin ludis, ke li profunde korduŝis ĉiujn.

Pli malfrue pro tiu okazo mi pensis: arto sen amo ne estas arto, kaj amo sen sufero ne estas amo, ĉio cetera ĝi estas, nur ne amo, kaj en la amo de Kosta estis tiom multe da sufero.

Mi akompanadis kaj samtempe ne el-lasis el la okuloj la aŭskultantojn.

La sinjorino ĉe la lasta tablo aŭskultis kun larĝe malfermitaj okuloj kaj kiam ili pleniĝis per brilo kaj eklarmis, ŝi turnis la vizaĝon kaj ekrigardis aliflanken, al la maro.

Kosta finis.

Ŝi stariĝis, preterpasis la estradon kun iom mallevitaj okuloj kaj foriris.

Dum la sekvaj vesperoj Kosta ne ludis « Ave Maria ».

Foje mi proponis ĝin al li, sed li respondis:

« Ne ĉiam mi povas ĝin ludi, kiel konvenas, mi devas havi por tio apartan humoron ».

Mi ne intistis plu. La tagoj pasis, la belaj, apudmaraj sunaj somertagoj! Dum la tago mi eliris kun la kolego laŭ la bordo, ni banis nin, ni kuŝis sur

la sablo aŭ iris en la najbaran arbareton, interparolis, aŭ mi legis ion al li, kaj vespere ni ludis en la « Blanka Mevo » kaj tion pli multe por ni mem ol por la aliaj.

Alvenis la lastaj tagoj de aŭgusto.

Iun vesperon la sinjorino de la lasta tablo malfruis. Ŝi venis unu horon pli malfrue ol kutime, kaj por mia granda surprizo, akompanata de viro — alta, belstatura, kun sufiĉe solida ekstero. La unuan fojon mi vidis lin.

La lasta tablo estis okupita, la kelnero proponis al ni pli proksiman tian — ĝi estis la sola libera.

Dum la paŭzo mi aŭdis senvole par-ton de ilia interparolo. La viro diris: « Do morgaŭ. Vi ne malfruu de la vagonaro. Ni devas ellitiĝi pli frue ».

« Kial ne resti almenaŭ ankoraŭ kelkajn tagojn? Ankaŭ vi devas ripozi iom ».

« Mi ripozos en Varna, post kiam mi plenŝarĝos la ŝipon. La vaporŝipo forveturos la 5-an de septembro, post tio mi estos tute libera, kaj se vi volas, ni povos resti tie ĝis la 15-a ».

Ili parolis ankoraŭ ion. De ilia interparolo mi komprenis, ke ili estas ge-dzoj. La sinjorino estis vid-al-vide al ni. Ŝi ne ellasis Kostan el sia rigardo.

« Kio estas al vi? » demandis subite la edzo. « Ĉu vi malsanas? »

« Ho, ne, male, sed de la biero mia kapo iom konfuziĝis ».

« Se vi volas, ni foriru ».

« Ni restu iom ankoraŭ, por aŭdi ankoraŭ unu numeron ».

Iom poste Kosta stariĝis, kontrolis la akordon de sia violono kaj diris al mi mallaŭte:

« Ĉu vi volas, ke ni ludu. — Ave Maria —? » Liaj lipoj ekstremis.

Ni komencis.

Kosta ludis kun humoro. Mi apenaŭ tuŝis la klavojn, timante detrui la sorĉan iluzion: antaŭ miaj okuloj malkovriĝis nova, nekonata mondo; la mondo de la eterna beleco kaj la sufero pro ĝi.

Malleviste siajn kapojn ĉiuj aŭskultis. Ankaŭ la maro kvietiĝis kaj forlogiĝis en la ritmon de la kanto.

Mallaŭte, preskaŭ silentiĝis la lastaj sonoj de la violono. Kosta mallevis la brakon.

Tomba silento.

Post momento ventego de aplaŭdoj alportiĝis de ĉiuj tabloj.

« — Brave!... Bi-is » Bi-is! — aŭdiĝis de ĉie.

Kosta ripetis. Li ripetis denove same tiel — majeste, kortuŝe. Tiun vesperon mi neniam forgesos. Nigra fasko da haroj falis lian ŝvitan frunton.

Post kiam ni finis, la sinjoro de la najbara tablo stariĝis kaj proksimiĝis al la estrado.

« Sinjoro! » li turnis sin al Kosta, « mi ne povas esprimi mian ekstazon, la mian kaj precipe tiun de mia edzino. Tio ĉi estas ŝia plej amata melodio. Ĉiun tagon ŝi ripetas ĝin. Milfoje mi aŭskultis ĝin. Sed ĉi-vespero restos memorinda por mi — tio nomiĝas majstraĵo. Permesu al mi premi vian manon. Mi petas vin, iom poste ludu ĝin ankoraŭfoje — pro mia edzino. Morgaŭ ni forveturos kaj ne havos la feliĉon plu aŭdi vin ».

Kosta preskaŭ nenion povis respondi, tiom li estis konfuzita.

Iom poste, kiam por la tria fojo ni ludis « Ave Maria », nur kelkajn tak-

tojn antaŭ la finalo, meze de la fortiĝinta silento. aŭdiĝis facila klaketo: Klak — ŝiriĝis unu el la kordoj de la violono. Kosta ŝanĝis la pozicion kaj finis sur alia kordo; la finalo eksonis dolorige, sufoke — kiel neniam; kvazaŭ en ĝi la blinda violonisto malfaldis sian tutan animon, sian tutan neelporteblan doloron.

La sinjorino kun la nigraj okuloj rigardis al la maro kaj apenaŭ haltigis siajn larmojn.

Post la finiĝo de la kanto, la viro fintrinkis sian bieron, pagis kaj proponis foriri. Ili preterpasis malrapide nin, eliris el la ĝardeno kaj perdiĝis en la nokto. Neniam plu mi renkontis tiun virinon.

« Ĉu ĉi foriris? » demandis min post nelonge Kosta kaj transdonis al mi sian violonon por ke mi metu sur ĝin novan kordon.

« Jes Kosta, ili foriris ».

Streĉante la kordon mi vidis interne, ĉe lumradio, penetranta en malfermaĵon de la violono, surfunde, ian portreton etan, algluitan. Mi fiksis la rigardon kaj rekonis la nigraokulan sinjorinon. Ĉe angulo de la portreto mi legis: « Al mia fianĉo de la eterna linamanta Maria. »

Mi rigardis al Kosta. Lia vizaĝo estis pala kun premsigno de rezigna trankvilo.

ESPERO KATOLIKA

Oficiala organo de la Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista (IKUE)

Rajtigo de la tribunalo de Milano n. 208 (27 majo 1971)

Respondeca direktoro: Longoni Ferdinando

Via s. Ambrogio 2 - Tel. 9960050 - I - 20051 Limbiate (MI)

Presejo: Soc. Tipo-litografica G. e M. Bigliardi - Via Tana 18 - I - 10023 Chieri (TO)

Ekspedo per poŝtabono - Gr. III/70 - Supplemento al n. 11 de « Lungo la via »